

## 23 LIBERIGITO

"Do, ĉu vi komprenis, Záruba?" demandis direktoro de prizono, preskaŭ solene finleginte koncernan akton de ministerio por la justico. "Tio signifas, oni kondiĉe pardonas al vi reston de via dumviva puno. Vi punpasigis dek du jarojn kaj duonon kaj dum la tuta tempo vi kondutis... nu, koncize, modele; ni donis al vi plej bonan ateston kaj... hm... unuvorte, vi povas iri hejmen, ĉu vi komprenas? Sed memoru, Záruba, se vi farus ian friponaĵon, do la kondiĉita liberigo nuliĝos kaj vi devos punsidi dumvivan karceron pro murdo de via edzino Maria, kaj tiam Dio mem ne helpos al vi. Do atenton, Záruba; venonte ĝi estus ĝismorte." Sinjoro direktoro kortuŝite mungis. "Ni ŝatis vin, Záruba, sed duan fojon mi ne volus vin ĉi tie vidi. Do adiaŭ, kaj sinjoro administranto elpagos al vi vian monon. Vi povas iri."

Záruba, preskaŭ dumetra longulo transpiedumis kaj ion balbutis; li estis tiom feliĉa, ke tio eĉ doloris lin, kaj aŭdiĝis io kiel plorsingulto. "Nu, nu," murmuris la direktoro. "Nur ne komencu plori al ni. Ni preparis por vi ian veston kaj konstruisto Málek promesis al mi doni al vi okupon - Kion, unue vi volas hejmen? Ha, al tombo de via edzino. Nu, tio estas de vi bela. Do, feliĉan vojaĝon, sinjoro Záruba," rapidis diri la direktoro kaj aletendis al li la manon. "Kaj estu singarda je vi, pro Kristo, memoru, ke vi estas liberigita nur kondiĉe." "Tia brava homo," diris la direktoro, apenaŭ oni fermis pardon post Záruba. "Mi diras al vi, Formánek, ke tiuj murdintoj estas ege bonaj homoj; la plej malbonaj estas fraŭduloj, al tiuj en malliberejo nenio estas sufiĉe bona. Domaĝe pri Záruba!"

Kiam Záruba havis post si la feran pardon kaj ankaŭ korton de la pankraca prizono, li sentis sin necerte kaj estis plena de angoro, ke la unua inspektisto lin haltigos kaj rekondukos; kaj li lante iris por ke ne ŝajnu, ke li fuĝas.

## 23 PROPUŜTĚNÝ

"Tak co, rozuměl jste, Zárubo?" ptal se ředitel věznice, když téměř slavnostně dočetl příslušný akt od ministerstva spravedlnosti. "To znamená, že se vám podmíněčně promíjí zbytek vašeho doživotního trestu. Odseděl jste si dvanáct a půl roku a po tu celou dobu jste se choval... no, zkrátka, vzorně; my jsme vám dali nejlepší vysvědčení a... eh... jedním slovem, můžete jít domů, rozumíte? Ale pamatujte si, Zárubo, kdybyste něco provedl, tak to podmíněčné propuštění pomine a vy si budete muset odsedět ten doživotní trest za vraždu na své manželce Marii, a pak už vám ani pámbu nepomůže. Tak si dejte pozor, Zárubo; příště by to bylo nadosmrti." Pan ředitel se dojatě vysmrkal. "My jsme vás tu měli rádi, Zárubo, ale podruhé bych vás tu nechtěl vidět. Tak spánembohem, a pan správce vám vyplatí vaše peníze. Můžete jít."

Záruba, čahoun skoro dvoumetrový, přešlapoval a něco koktal; byl tak šťasten, že ho to až bolelo a že v něm hrkalo cosi jako zavzlykání. "No tak, no tak," bručel ředitel. "Jen se nám tu nerozbrečte. Uchystali jsme vám nějaké šaty, a stavitel Málek mně slíbil, že vás vezme do práce. – Co, vy se chcete dřív podívat domů? Aha, na hrob své ženy. No, to je od vás hezké. Tak šťastnou cestu, pane Zárubo," řekl honem ředitel a podal Zárubovi ruku. "A dejte si na sebe pozor, prokrista, pamatujte, že jste venku jen podmíněčně!"

"Takový hodný člověk," povídal ředitel, sotva se za Zárubou zavřely dveře. "Já vám řeknu, Formánku, tihle vrahové bývají moc slušní lidé; nejhorší jsou defraudanti, těm není v kriminále nic recht. Škoda toho Záruby!"

Když tedy Záruba měl za sebou železná vrata i dvůr pankrácké věznice, měl ještě takový nejistý a pokorný dojem, že ho nejbližší dozorce zadrží a dovede zpátky; i loudal se pomalu, aby se nezdálo, že utíká.

Kiam li atingis straton, li havis vertiĝon, tiom da homoj ekstere, tie kurludas infanoj, du ŝoforoj disputas, mia dio, tiom da homoj, tio iam ne estis, kien nun iri? Egale; tiom da veturiloj kaj tiom da virinoj, ĉu neniuj postiras min? Ne, sed kiom da veturiloj!

Záruba longpaŝis al urbocentro de Prago, por esti laŭeble plej malproksime; ekodoris kolbasejo, sed nun ne, nun ankoraŭ ne; poste ekodoris io pli forte: novkonstruaĵo. Masonisto Záruba haltis kaj flaris odoron de mortero kaj traboj. Li rigardis maljunulon miksanta kalkon; li emis ekparoli, sed ne povis, el lia gorĝo eliĝis neniuj sonoj, en izolaresto oni dekutimiĝas paroli.

Záruba longpaŝe mergiĝis en Pragon. Miadio, kiom da konstruaĵoj! Oni faras tion tute el betono, antaŭ dek du jaroj tio ne estis, ne estis, tio miatepe ne estis, opiniis Záruba, ĝi devas ja fali, tiaj maldikaj pilieroj! "Atenton, homo, ĉu vi estas blinda?" Preskaŭ surveturus lin aŭto, preskaŭ li troviĝus sub tinteganta tramo; damne, post dek du jaroj oni dekutimiĝas de stratoj; ŝate li demandus iun, kio estas tiu granda konstruaĵo; ŝate li demandus, kiel li venu al la Nordokcidenta Stacidomo; ĉar ĵus preter li bruis kamiono, li provis por si mem diri laŭte: "Mi petas vin, tra kie oni venas al la Nordokcidenta Stacidomo?" Ne, ne eblas; la voĉo aŭ kio sekiĝis en li, tie supre oni rustiĝas kaj mutiĝas; en la unuaj tri jaroj oni iam-tiam ion demandas, sed poste oni ĉesas. "Mi petas vin, tra kie oni iras -" Nur io stertoris en la gorĝo, sed la homa voĉo ĝi ne estis.

Longpaŝe kuras Záruba tra la stratoj. Estas al li, kvazaŭ li estus ebria, kvazaŭ li irus sonĝe; ĉio estas tute alia ol antaŭ dek du jaroj, pli granda, brua, konfuza. Nur kiom da homoj estas! Záruba sentas triston, ŝajnas al li, ke li estas ie en fremdlando kaj ke eĉ li ne interkompreniĝos kun la homoj. Nur se li trovas la stacidomon kaj povus veturi hejmen, hejmen ... La frato havas tie dometon kaj infanojn... "Mi petas, kiel mi venos," provas Záruba diri, sed nur senvoĉe movas la lipojn. Ba, hejme tio pasos, hejme mi komencos paroli; nur se mi trovas la stacidomon!

Když vyšel na ulici, motala se mu hlava, tolik lidí je venku, tamhle se honí děti, dva šoféři se hádají, bože, těch lidí, to dřív nebývalo, kam vlastně jít? To je jedno; samé vozy, a tolik ženských, nejde nikdo za mnou? ne, ale těch vozů co je!

Záruba si to natíral dolů k Praze, aby už byl co nejdál; zavonělo mu uzenařství, ale teď ne, teď ještě ne; pak zavonělo něco ještě silněji: novostavba. Zedník Záruba se zastavil a čichal vůni malty a trámů. Díval se na strejdu, jak míchá vápno; měl chuť se dát do řeči, ale jaksi nemohl, nevyšel z něho žádný hlas, člověk si v samovazbě odvykne mluvit.

Záruba dlouhými kroky sestupoval do Prahy. Proboha, to je nějakých staveb! Tadyhle to dělají celé z betonu, to před dvanácti lety nebylo, to nebylo, to za mých časů nebylo, mínil Záruba, ale vždyť jim to musí spadnout, takové tenké pilíře! "Pozor, člověče, copak jste slepý?" Málem by ho přejelo auto, málem by vlezl pod řinčící tramvaj; sakra, člověk za dvanáct let odvykne ulicím. Rád by se někoho zeptal, co je to za velikou stavbu; rád by se zeptal, kudy má jít na Severozápadní nádraží; protože zrovna podle něho rachotil kamión se železem, zkusil sám pro sebe říci nahlas: "Prosím vás, kudy se jde na Severozápadní nádraží?" Ne, nejde to; nějak v něm zaschl hlas či co, člověk tam nahoře zrezaví a oněmí; první tři roky se ještě sem tam na něco zeptá, ale pak už přestane. "Prosím vás, kudy se jde -" Jenom mu to zachřčelo v krku, ale lidský hlas to nebyl.

Dlouhými kroky ubíhá Záruba do ulic. Je mu, jako by byl opilý nebo jako by šel ve snách; ono je všechno docela jiné než před těmi dvanácti roky, větší, hlučnější a zmatenější. Jenom těch lidí co je! Zárubovi je z toho až smutno, zdá se mu, že je někde v cizině a že se s těmi lidmi ani nedomluví. Jenom kdyby se dostal na nádraží a mohl jet domů, domů... Bratr tam má chalupu a děti... "Prosím vás, kudy se jde," pokouší se Záruba vyslovit, ale jen bezhlase hýbá rty. Eh co, doma to přejde, doma se rozmluvím; jen na to nádraží kdybych se dostal!

Subite aŭdiĝis krio post li, kaj iu impete altiris lin sur trotuaron. "Homo, kial vi ne iras sur trotuaro," bruskis je li ŝoforo. Záruba volis respondi, sed ne povis; nur li kraĉtuis kaj kuras plu. Sur trotuaro, li pensas, por mi trotuaro estas mallarĝa; homoj, tiel mi rapidas, mi volas esti hejme, mi petas vin, kiel mi venos al la Nordokcidenta Stacidomo? Versimile tra la plej frekventata strato, li decidiĝis, tra ĉi tie, kie veturas multaj tramoj. De kie venas tiom da homoj? Ja tio estas masoj, kaj ĉiuj iras la saman direkton, certe ĝi kondukas al la stacidomo, tial ili kuras, por ne maltrafi la trajnon.

Longulo Záruba akcelis la paŝojn, por ne resti malantaŭe; kaj vidu, ankaŭ al la aliaj homoj la trotuaroj ne plu sufiĉas, ili amasiras meze de strato, densa kaj muĝanta homamaso; kaj senĉese aliĝas pluaj, trotas kaj ion krias; kaj tiumomente ili ĉiuj komencis krii kaj potence kriegi. Záruba ekzaltita de la bruo vertiĝis. Miadio, kia beleco, tiom da homoj! Tie antaŭe ili komencis ion kanti laŭ la marŝtakto, Záruba paŝoŝanĝas kaj vivbole marŝas, jen, nun kantas ĉiuj ĉirkaŭ li, en Záruba io moliĝas kaj ŝvelas, en la gorĝo premas, ĝi devas eligi kaj ĝi estas kanto, unu, du, unu, du, Záruba kantas kanton sen vortoj, zumkantas, zumkantas basprofunde, kia melodio ĝi estas? Estas egale, mi veturas hejmen! Longulo Záruba marŝas jam en la unua vico kaj kantas, tio ne estas vortoj, sed ĝi estas tiel bela, unu, du, unu, du, kun la levita mano Záruba elefante trumpetas, estas al li kvazaŭ sonus lia tuta korpo, la ventro tambure tremas, la torako laŭte sonegas kaj en la gorĝo estas tiel bone, tiel bone kvazaŭ dum la drinkado aŭ plorado.

Miloj da homoj krias "Fi! Fi al la registaro!" sed Záruba ne povas percepti, kion oni vokas kaj venke trumpetas "A-a A-a!" Svingante la longan manon iras Záruba frunte de ĉiuj, blekas kaj henas, kantas kaj bruegas, pugne tamburas la torakon kaj eligas grandan krion leviĝanta super ĉies kapoj, kiel flagranta flago.

Najednou za ním křik, a někdo ho strhl na chodník. "Člověče, proč nejdete po chodníku?" hartusí na něho šofér. Záruba by chtěl odpovědět, ale ono to nejde; jen odchrchlá a běží dál. Po chodníku, myslí si, pro mne je chodník málo; lidi, já mám tak naspěch, já chci být doma, prosím vás, kudy se jde na Severozápadní nádraží? Asi tou nejživější ulicí, rozhodl se, tady, co jede ta řada tramvají. Kde jen se nabere tolik lidí? Vždyť to jsou celé zástupy, a všichni jdou jedním směrem, to jistě je k nádraží, proto tak běží, aby jim neujel vlak.

Čahoun Záruba přidal do kroku, aby nezůstal vzadu; a vida, ani těm lidem už nestačí chodníky, valí se prostředkem ulice, hustý a hlučící dav; a pořád se přidávají noví, běží poklusem a něco křičí; a vtom počali křičet všichni dlouhým a širým řevem. Zárubovi se zatočila hlava opojením hluku. Hergot, je to krása, tolik lidí!

Tam napřed začali zpívat něco do pochodu. Záruba vyrovnává krok a rozjařeně šlape, hele, teď zpívají všichni kolem něho, Zárubovi něco jihne a nabíhá v krku, jako by ho to tlačilo, musí to ven a je to zpěv, ráz dva, ráz dva, Záruba zpívá píseň beze slov, bručí si, brouká hluboký bas, jak je ta píseň? to je jedno, já jedu domů, já jedu domů! Dlouhán Záruba šlape už v první řadě a zpívá, nejsou to slova, ale je to tak krásné, ráz dva, ráz dva, se vztyčenou rukou troubí Záruba jako slon, je mu, jako by znělo celé jeho tělo, břicho se chvěje jako buben, hrudník hlasitě duní a v hrdle to dělá tak dobře, tak dobře, jako bys chlastal nebo plakal. Tisíce lidí křičí "Hanba! Hanba vládě!", ale Záruba nemůže pochytit, co to volají, i vytrubuje vítězně "A-á! A-á!" Mávaje dlouhou rukou jde Záruba v čele všech, hýká a řičí, zpívá a burácí, bubnuje si pěstmi do hrudníku a vyráží veliký křik, který ční nad hlavami všech jako vlající prapor.

"Uava, uava," trumpetas Záruba plengorĝe, plenpulme, plenkore, dume fermante la okulojn kiel kokerikanta koko. "Uava! Aaa! Hura!" Nun la homamaso haltis kaj ne povas plu, konfuze onde retiriĝas, anhelas kaj hirtiĝas ekscitite kriante. "Uava! Hu-ra!" Záruba kun la fermitaj okuloj fordonas sin al la granda liberigita voĉo eliĝanta el lia interno.

Subite kaptrenas lin ies manoj kaj spirmanka voĉo stertoras en la orelon: "En nomo de la leĝo, mi arestas vin." Záruba konsternite ekokulis; sur unu lia mano pendas policisto kaj tiras lin el la areto spasme skuiĝanta.

Záruba ekveis pro hororo kaj volas elŝiri sian manon for de la policisto ĝin tordanta; Záruba ekkriegis pro doloro kaj per la alia mano bategis la kapon de policisto kiel per klabo. La policisto ruĝiĝis kaj liberlasis lin; tiumomente kapo de Záruba estis trafita de gumklabo, kaj denove, denove, denove! Du grandaj manoj rotaciis kiel aloj de ventmuelilo kaj frapas ies kapojn; tiam du homoj en kaskoj pendiĝis al ili kiel buldogoj, Záruba singultante pro hororo klopodas ilin deskui, piedbatas ĉirkaŭ si, freneze baraktas, estas ien trenata kaj puŝata, du policistoj kondukas lin je la torditaj manoj tra malplena strato, unu, du, unu, du, Záruba iras kiel ŝafeto, mi petas vin, kiel oni venas al la Nordokcidenta Stacidomo? mi volas ja veturi hejmen.

Du policistoj preskaŭ ĵetis lin en komisarejon. "Kiel vi nomiĝas?" bruskis je li mava kaj malvarma voĉo. Záruba ŝatus respondi, sed nur movigas la lipojn. „Do, via nomo!“ krias mava voĉo. "Záruba Antono," raŭke flustras la longulo. "Domicilo?" Záruba senkonsile ŝultrolevis. "En Pankraco," li elbuŝigis. "En izolkarceron."

Tio tamen ne darfis esti, sed okazis la jena: tri juristoj interkonsiliĝis, kiel helpi al Záruba, prezidanto de la senato, prokuroro kaj advokato ekster ofico. "Záruba ne tion simple," opiniis la prokuroro. "Ne eblas," murmuris la prezidanto de la senato.

"Uavá, uavá," trubi Záruba z plna hrdla, z plných plic, z plného srdce, zavíraje přitom oči jako kokrhající kohout. "Uavá! Aaa! Huráá!" Nyní se dav jaksí zastavil a nemůže dál, couvá zmatenou vlnou, supí a naježí se rozčilenými skřeky. "Uavá! Huráá!" Záruba se zavřenýma očima se oddává tomu velikému a osvobozenému hlasu, který stoupá z jeho nitra.

Najednou se na něho sápour nějaké ruce a udýchaný hlas mu chrčí do ucha: "Ve jménu zákona vás zatýkám!" Záruba vytřeštil oči; na jedné jeho ruce visí strážník a vytahuje ho z hloučku, který sebou křečovitě cloumá.

Záruba hekl hrůzou a chce vyrvat ruku strážníkovi, který mu ji zkrucuje; tu zařval Záruba bolestí a druhou rukou jako palicí praštil strážníka do hlavy. Strážník zrudl a pustil ho; vtom dostal Záruba obuškem do hlavy, a zas, zas, zas! Dvě ohromné ruce se roztočily jako větrný mlýn a dopadaly na nějaké hlavy; tu se na ně pověsili dva lidé v přilbách jako buldoci, Záruba zajíkaje se děsem je hledí setřást, kope kolem sebe, zmítá sebou jako šílený, je někam vlečen a strkán, dva strážníci ho vedou za zkroutené ruce prázdnou ulicí, ráz dva, ráz dva, Záruba jde jako ovečka, prosím vás, kudy se jde na Severozápadní nádraží? dyť já mám jet domů. Dva strážníci ho téměř hodili na komisařství. "Jak se jmenujete," spustil na něho zlý a studený hlas. Záruba by to rád řekl, ale jen hýbá rty. "No tak, jak se jmenujete," zařval zlý hlas. "Záruba Antonín," šeptá čahoun sípavě. "Bytem?" Záruba bezradně pokrčil rameny. "Na Pankráci," vypravil ze sebe. "V samovazbě." Ono to sice nemá být, ale stalo se to: tři právníci se radili, jak z toho dostat toho Zárubu ven, předseda senátu, státní návladní a advokát ex offo. "Tak ať to ten Záruba zapře," mýnil státní návladní. "To nejde," bručel předseda senátu.

"Dum la enketado li konfesis, ke li batiĝis kun la policistoj. Tia imbecilo, mem konfesi -"

"Se la policistoj depozicius," proponis la advokato, "ke ili ne ekkonas kun certeco tiun Záruba, ke tiu povus esti iu alia -"

"Mi petas vin," protestis la prokuroro, "tio ankoraŭ mankas, ke ni igu policistojn mensogi! Ja, ili tiun Záruba ekkonas kun certeco - Mi estus por sensperturbo. Proponu esploron de lia psika stato, sinjoro kolego; mi aliĝos al la propono."

"Bone," diris la advokato, "mi proponos tion; sed kio, se kuracistoj ne agnoskos lin frenezulo?"

"Mi priparolos tion kun ili," koncedis la senatestro. "Tamen ĝi ne darfus esti, sed - Ĉe diablo, mi ne volus, ke Záruba devu pro tia bagatelaĵo dumvive punsidi. Prefere mi vidus min ie ajn for. Pro Jesuo Kristo, mi donus al li ses monatojn, eĉ ne palpebruminte; sed ke li devu punpasigi reston de la dumviva karceru, sinjoro, tio ege ne plaĉus al mi."

"Se ne helpas la sensperturbo," meditis la prokuroro, "ĝi stas ege malbele. Miadio, mi petas vin, mi devas tion akuzi kiel krimon; kion alian mi komencu kun tio? Se la stultulo estus haltinta almenaŭ ie en gastejo! El tio ni konstruos ian neresponsivecon -"

"Mi petas vin, sinjoroj," insistis la senat-prezidanto, "estu al mi helpemaj, ke mi povu lin liberigi. Mi estas maljuna homo kaj ne ŝatus preni sur min - nu, ja vi scias, kion."

"Malfacila afero," ĝemis la prokuroro. "Nu, ni vidos. Almenaŭ ĝi treniĝos kun psikiatroj. Do morgaŭ estas la proceso, ĉu?"

Sed la proceso ne okazis. Tiunokte Antono Záruba pendumis sin, evidente pro timo antaŭ la puno. Ĉar li estis tro longa, li pendis tiel strange, kvazaŭ li sidus sur planko.

"Damna afero," murmuris la prokuroro, "miadio, kia malsaĝa afero. Sed almenaŭ ni ne kulpas pri tio."

"On se už ve vyšetřování přiznal, že se s těmi policajty pral. Trouba jeden, když se sám přiznal -"

"Kdyby ti strážníci vypověděli," navrhoval advokát, "že toho Zárubu s určitostí nepoznávají, že to mohl být někdo jiný -"

"Prosím vás," protestoval státní návladní, "to tak, abychom učili policajty lhát! Když toho Zárubu určitě poznávají - Já bych byl pro pominutí smyslů. Navrhněte prozkoumání duševního stavu, pane kolego; já se k tomu připojím."

"Copak o to," řekl advokát, "já to navrhnu; ale co když nám ho doktoři neuznají za blázna?"

"Já s nimi promluví," uvoloval se předseda senátu. "Ono to sice nemá být, ale - U čerta, to bych nerad, aby ten Záruba musel pro tu hloupost doživotně sedět. Já bych se raději viděl nevím kde. Prokristapána, já bych mu dal šest měsíců, ani bych nemrknul; ale aby si pak musel odsedět zbytek doživotního kriminálu, pane, to by se mně zatraceně netento, nelíbilo."

"Nepomůže-li nám pominutí smyslů," uvažoval státní zástupce, "tak to vypadá moc škaredě. Proboha vás prosím, já to musím zažalovat jako zločin; co si s tím mám jiného počít? Kdyby se byl ten pitomec stavil aspoň někde v hospodě! Z toho bychom už upletli nějakou tu nepřičetnost -"

"Prosím vás, páni," naléhal předseda senátu, "nějak mně to už udělejte, abych ho mohl pustit. Já jsem starý člověk a nerad bych bral na sebe - no, však víte co."

"Těžká věc," vzdychl státní návladní. "No, budeme vidět. Aspoň se to s těmi psychiatry protáhne. Tak zítra je líčení, že?"

Ale k líčení ani nedošlo. Té noci se Antonín Záruba oběsil, patrně ze strachu před trestem. Protože byl příliš dlouhý, visel tak divně, jako by seděl na zemi.

"Zatrápená věc," bručel státní návladní, "hergot, to je hloupá věc. Ale aspoň že my za to nemůžeme."